

Heinrich Heine,  
Libro de la kantoj, Songobildoj, X

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Mi multaj mortintoj priĵuris  
Per forto de mia vort'.  
Sed ili nun jam forkuris  
Al nokto kaj al mort'.

La vorton malsovaĝigan  
De l' majstro forgesis mi  
Kaj en la nebulon timigan  
Nun tiras min tiuj ĉi.

Min lasu, demonoj malhelaj,  
Min lasu, forigu vin!  
Ankoraŭ plezuroj tre belaj  
Ĉi tie atendas min.

Por trovi la sorĉo-floron  
Mi devas streĉi min.  
Ĉu havas la vivo valoron,  
Se mi ne malkovros gin?

Deziras mi unu fojon  
Ŝin premi al mia kor',  
Por senti ĉielan ĝojon,  
Ŝin kisi kun dolor'.

Mi volas nur unu fojon  
Amvorton aŭdi de ŝi,  
La malhelegan vojon  
Tuj iros mi kun vi.

La demonar' ĝin aŭdintas,  
Terure kapjesas ĝi.  
Mirakla floret', mi venintas.  
Amata, ĉu min amas vi?

*Traduko de la Germana poemo "Buch der Lieder, Traumbilder, X" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1984.*

*Arg-698-1406 (2012-12-05 22:57:02)*